
# KONGRESA LIBRO DE LA 75 HEK





Kiu trovos tion
ricevos premion

Komuniku ĝin
al Boletín

Fotu la bildon
por havi konfirmon

# Enhavtabelo


| | |
|---|---|
| Enhavtabelo | paĝo 3 |
| Saluto de Sekretariino de Kulturo | paĝo 5 |
| Saluto de Prezidanto de Provinca Deputitaro | paĝo 7 |
| Saluto de Urbestro de Herrera del Duque | paĝo 9 |
| Loka Kongresa Komitato | paĝo 10 |
| Saluto de Prezidanto de HEF | paĝo 11 |
| Ekstremaduro | paĝo 13 |
| La Siberio | paĝo 14 |
| Herrera del Duque | paĝo 17 |
| Guadalupe | paĝo 19 |
| Programo | paĝo 20-23 |
| Ibera Skolo | paĝoj 23-25 |
| Siberia Skolo | paĝo 26 |
| Listo de hispanaj kongresoj | paĝo 27 |
| Listo de aliĝintoj | paĝo 28-31 |
| Salutvortoj de la prezidanto de UEA | paĝo 33 |
| Partoprenantoj de la Hispana Kongreso | paĝo 35 |



Tipa fenestro de Herrera del Duque



Karaj gekongresanoj,

Mi volas transdoni al vi nian plej sinceran bonvenon al Ekstremaduro kaj al la ekstremadura Siberio, nome tiu komarko tiom alloga kaj nature kaj kulture. Nia regiono proponas al la ekstremadura loĝantaro kaj al ĉiuj personoj kiuj vizitas nin modernajn komunikvojojn, hotelajn, edukajn, kulturajn, kaj sociajn instalaĵojn, kaj ekonomion bazitan ĉefe sur la agrikulturo kaj la bestobredado. En sekaj zonoj, la produktado de oleo, vino kaj cerealoj konigas nin ekster niaj limoj, same kiel la brutobredado, ĉefe de porkoj kaj ŝafoj. Krome, la natura riĉeco de niaj pejzaĝoj kaj la granda historia heredo de niaj vilaĝoj kaj urboj baziĝas suu tre valora kultura pasinteco kiu antaŭeniras al la estonteco. Ĉio tio restas je via dispo-no.


La entrepreno kiu movas vin, tio estas, la uzado kaj helpo al la interna-cia lingvo Esperanto diras multon en via favoro, kiam oni identigas vin kiel komunumo de personoj interesa-taj en la kultura egaleco kaj en la reciproka alproksimiĝo de la plej diversaj popoloj. Tiudirekte mi dan-kas vin pri la klopodoj kiujn vi estis farintaj por allogi al nia tero vizitantojn de tiom variaj kaj interesaj profiloj, kiuj certe alportos reen al siaj devenlokoj la allogaĵojn de nia regiono. Mi gra-tulas vin pro la bona laboro kaj socia kaj kultura kiujn vi faras kaj mi kuraĝigas vin sekvi sur la vojo de la helpo kaj disvastigo de la kulturo pere de Esperanto kiel komuna lingvo.

Ni esperas ke vi vivu agrablajn tagojn inter ni kaj ni invitas vin reveni baldaŭ al nia tero, nome ampleksa kaj diversa regiono kiu havas multon proponotan, kaj por tiu ĉi veturo kaj por aliaj venontaj en la estonteco.

Miriam García Cabezas

Ĝenerala Sekretariino pri Kulturo de la Junta de Extremadura

---







Mi dankas la inviton skribi tiujn liniojn en la libro de la 75a Hispana Kongreso de Esperanto. Mi speras ke tiu kunsido estu fruktodona kaj ke la konkludoj utilu por la celo por kiu ĝi estis kunvokita.

Sed, super ĉio, ege plaĉas al mi la loko kiun vi elektis por la realigo de la kongreso kaj ties moto, "Ekstremaduro: lando de limoj kaj kontaktoj". Mi aldonus ion pli, nome ke tiu regiono estas malferma tero. Malferma por ricevi ĉiujn kiuj volas koni niajn historion, kulturon, arta kaj natura heredoj aŭ kuirarto.

Dum tiuj tagoj vi konstatos ke la ekstremaduranoj estas personoj al kiuj plaĉas plenumi gastajn taskojn, ĉar krome ni sentas nin fieraj je tio kion ni havas. Vi estas en Herrera del Duque, ene de komarko nomita Siberio kiu laŭnome povus elvoki malproksiman teron kaj dezertan pejzaĝon. Tute for de la realo.

Mallonga trairado tra la zono permesas onin malkovri allogegan pejzaĝon, kun rimarkinda vegetaĵaro kiu ĉirkaŭas belegajn lagojn kaj en kiu loĝas nombraj bestospecioj.

Nun ni estas enmetitaj en preciza celo: atingi ke la UNESCO deklaru La Siberia kiel Natura Rezervejo de la Biosfero. Se oni rigardas ĉirkaŭe, al la pejzaĝon kiun ĵus oni priskribis, vi konstatos ke estas sufiĉaj tialoj por atingi tiun celon. Pro tio, plaĉus al mi ke ankaŭ vi apogu, plej bone eble, tiun iluziigan projekton en kiu estas enmetitaj ni ĉiuj ekstremaduranoj.

Mi ripetas mian kontentigon ĉar vi elektis Ekstremaduron kiel sidejo de la Kongreso kaj mi esperas ke ni povu rericevi vin iam ajn.

Miguel Ángel Gallardo Miranda
Prezidanto de la Diputación Provincial de Badajoz



Bela fontano ĉe la placo de la urbeto



Karaj gekongresanoj:

Estas honoro al mi, kiel urbestro, kaj al la civitanoj de Herrera del Duque, ke vi estis elektinta nian municipon, jam ankaŭ vian, por la okazigo de la 75a Kongreso de Esperanto.

Esperanto, kiu intencas esti lingvo kun internacia gravo kaj esti uzata kiel dua lingvo por komunikado post la denaska lingvo, havas ligita senton de solidareco inter la homoj, antaŭmetante la solidarecon inter popoloj prefere al ajna etna, lingva aŭ ŝtata diferencoj.

Tiu solidareca sento estas kio plej plaĉas al mi el tiu nova aventuro, pro tio ekde la momento kiam nia urbano kaj esperantisto Javier Romero Tello transdonis al ni la intencon de la Asocio de Esperanto okazigi en Herrera del Duque tiun kongreson, ni havis neiun ajn dubon tiurilate.

Herrera del Duque estas solidareca vilaĝo kaj se io identigas niajn homojn estas la gastigemo, pro tio, mi certas, vi pasigos agrablegajn tagojn inter ni kaj tiuokaze la lingvo ne estos absolute problemo por la interkomprenigo.

Sen plie, mi deziras al vi neforgeseblan estadon kaj ĝuadon de la etoso, naturo, akvo, heredo, kulturo kaj tradicio kiu ĉirkaŭas Ekstremaduron, la komarkon La Siberia kaj Herrera del Duque.

Estu gebonvenataj. Feliĉa estado.

Urbestro de Herrera del Duque.
Saturnino Alcázar Vaquerizo.


# Loka Kongresa Komitato




Prezidanto de la LKK
Kongresejo
Javier Romero



Helpantino
Kongresanoj
Karmela Cidoncha



Sekretario de la LKK
Junulargastejo, ekskursoj
José Salguero



Helpanto
Rilatoj kun HEF
José Antonio del Barrio



Helpanto
Spektakloj
Miguel Fernández



Kasisto LKK
Raúl Martínez
Kotizoj



Karaj gekongresanoj:

Estu bonvenaj al la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto. La nombro ja estas ronda, kaj do la Kongreso estas iel jubilea, en nia sinsekva ordigo de kongresoj. Sed ĝi estos eksterordinara ne pro tio, sed pro la loko kaj la kvalito de la programeroj, kiuj, ni certas, kontentigos ĉies atendojn.

Herrera del Duque, la urbo kiu nin gastigas ĉijare, probable estis nekonata por multaj el vi, kiam vi unuafoje eksciis ke nia kongreso okazos tie ĉi. Ĝi estas relative malgranda kompare kun aliaj antaŭaj kongresurboj, kaj ĝi troviĝas en regiono, Ekstremaduro, iom for el la kutimaj turismaj cirkvitoj en Hispanio. Sed veraj ŝatantoj de kulturo, de naturo kaj de historio scias ke Ekstremaduro —lando de limoj kaj kontaktoj, kiel prave asertas la kongresmoto— meritas vizitojn longajn kaj profundajn, kaj dum tiuj ĉi tagoj ni havos la ŝancon ĝui gravan parton de ĝiaj vidindaĵoj.

La urbo mem, Herrera, kaj ĝiaj pli proksimaj ĉirkaŭaĵoj surprizos multajn pro siaj valoroj, kaj montros la ĝustan gradon de intimeco por enmerĝiĝi samtempe en la lokan kaj esperantan kulturojn. La urbanoj kaj ĝiaj reprezentantoj montris jam antaŭ la komenco de la kongreso grandan bonvolemon kaj akceptemon, kaj ni certas ke tiu ĉi speciala etoso vidiĝos ankaŭ dum la evento, ĉar ĝuste la relativa modesteco de la urbo ebligos kontakti al ni pli profunde kun la loĝantaro. Krome, ni esperas krei pontojn de komunikado de la regiono kun aliaj partoj de la mondo, per nia lingvo kaj per la partopreno de amikoj devenantaj el malproksimaj landoj. Ke tiu ĉi distrikto estas konata kiel "La Siberio" montriĝos plensignifa en tiu ĉi kunteksto.

La programo estos densa kaj tre kompleta, espereble por ĉies gustoj. Ni aŭskultos grandan variecon da muziko, ne nur esperanta; ni denove ĝuos altkvalitan teatron; prelegoj kaj diskutoj traktos temojn ege diversajn kaj profundajn. Literaturo denove ĉefrolos, ĉifoje per du specialaj cirkonstancoj: la omaĝo al la Ibera Skolo, kaj ties rilato al Ekstremaduro (pri kiu vi pli scios dum la Kongreso mem) kaj la prezentado de novaj tre gravaj libroj kiuj ĉijare amase pliriĉigos la panoramon de la esperanta kulturo.

Ni ankaŭ ĝuos distrajn programerojn, ludojn, babiladojn, promenadojn. Pli novaj esperantistoj povos ekkoni la panoramon de la esperantista komunumo kaj kulturo, kaj ekkunlabori en la agadoj kaj streboj de la organizita movado. Ni (re)renkontos amikojn, ni praktikos la lingvon kaj foje ni eĉ provos trankvile ripozi. Certe ĉiu el vi trovos la tempon kaj la manieron ĝui la momenton kaj profiti tiun ĉi eksterordinaran okazon. Hispana Esperanto-Federacio kaj la lokaj organizantoj tion esperas.

José Antonio del Barrio
Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio


Valverde del Fresno
Villanueva de la Sierra
Ahigal
Aldeanueva del Camino
Montehermoso
Moraleja
Plasencia
Coria
Navalmoral de la Mata
Torrejoncillo
Zarza La Mayor
Alcantara
Monroy
Almaraz
Garrovillas
Santiago de Alcantara
Brozas
Navas del Madroño
Casar de Cáceres
Deleitosa
Valencia de Alcantara
CACERES
Trujillo
San Vicente de Alcantara
Torremocha
Logrosan
Alburquerque
Albalá
Miajadas
Herrera del Duque
Talarrubia
BADAJOZ
MERIDA
Don Benito
La Zarza
Peña El Sordo
Puebla de la Reina
Olivenza
Castuera
Zalamea de la Serena
Hornachos
Barcarrota
Burguillos del Cerro
Zafra
Maguilla
Zahinos
Jerez de los Caballeros
Granja de Torrehermosa
Oliva de la Frontera
Valverde de Llerena
Azuaga
Llerena
Fregenal de la Sierra
Bodonal de la Sierra
Segura de León
Fuentes de León

# Ekstremaduro

Ekstremaduro estas regiono en la sudokcidenta parto de Hispanio, en la angulo inter Portugalio (okcidente) kaj Andaluzio (sude). Ĝi komponiĝas el du provincoj, nome la norda duono, Cáceres [KAzeres], kaj la suda duono, Badajoz [badaĤOZ]. Tamen ne estas klara diferenco laŭ pejzaĝo aŭ loĝantaro inter la du provincoj. Tamen povas esti diferencoj aŭ specifaj trajtoj depende de la "komarkoj" aŭ regioneroj, nome montaraj en pleja nordo, centrokcidento kaj pleja sudo, valaj kaj tre fruktodonaj ĉe rivero Guadiana norde de la suda provinco, tradicia agrikultura en centro de Badajoz (Los Barros, la kotoj) aŭ brutobreda (ĉefe por ŝafaro, centre de la provinco Cáceres) se oni ĝeneraligas.



Historie temas pri regiono nek tre riĉa nek industriigita, tiele gravaj valoroj estas unuflanke la historiaj urboj, Mérida, Badajoz, Cáceres, Trujillo, Plasencia kaj aliaj, kaj aliflanke naturaj kamparareoj, ege vizitindaj ekzemple por amantoj de pejzaĝoj aû interesa faŭno, kiaj en la montaraj areoj aŭ la apartaj kamparoj ebenecaj.

Ekde kultura vidpunkto la ekstremaduranoj sentas sin kiel partikulara komunumo kun specifa parolmaniero (kvankam tio ne estas science vera), vivostilo (kvankam ankaŭ je tio estas gravaj diferencoj) kaj komuna interesaro (same). En la tuta Hispanio la regionaj, regionismaj kaj eĉ naciismaj sentoj (ĉu ĝeneraligaj aŭ apartigaj) akceliĝis ĉirkaŭ la 1970-aj jaroj. Tio iĝis speciale grava en la nomitaj historiaj regionoj, kiaj Katalunio, Eŭskio kaj Galegio, kaj duarange, Andaluzio. Ankaŭ aliaj regionoj havas sufiĉe apartan regionsenton, kiaj Aragono aŭ Kanarioj. Ekstremaduro estus triarange eble super kelkaj ne tiom komunumecaj kiaj Murcio aŭ Rioĥo, aŭ eĉ super Kastilio kiu perdis iel sian identecon post la starigo de la nova mapo de aŭtonomaj regionoj de la postdiktatura epoko.

# La Siberio

Krom turismaj urboj, troviĝas en Ekstremaduro aliaj distriktoj malpli konataj, apenaŭ vizititaj dum jarcentoj, pro la montaroj kaj la dum jarcentoj mizeraj komunikvojoj. Bonŝance la aliro dum la lastaj jaroj fariĝis ĝenerale multe pli facila, kaj do nun eblas viziti lokojn kiuj konservis, pro tiuj malfacilaĵoj, gravajn naturajn valorojn, multe malpli ĝenatajn de la amasa turismo.

Unu el tiuj distriktoj, pli frue konata kiel "La Montoj" akiris apartan famon pri izoliteco, kaj komencis esti nomata frue en la 20-a jarcento kiel "La Siberio". La nomo, komence iom moka, estis alproprigata de la loĝantoj mem, kaj nun aperas jam en oficialaj publikigaĵoj, en turismaj broŝuroj kaj en la ĉiutaga lingvaĵo. La distrikto enhavas 17 municipojn, el kiuj la plej grava estas Herrera del Duque. La loĝantaro estas tamen malgranda, pro la tre malalta loĝdenseco.

Ambaŭ aspektoj, iama izoliteco kaj malalta denseco, favoris la naturan riĉecon, kio nun fariĝis la ĉefa allogaĵo por turismaj vizitoj. La faŭno de la distrikto elstaras pro sia diverseco, ĉar vivas en la teritorio preskaŭ ĉiuj el la 500 specioj de naturaj vertebruloj priskribitaj en Ekstremaduro. Ĉe birdoj, pli ol la duono de la provinca populacio de ansergrifo troviĝas ĉe la krutaj ravinoj de la ĉirkaŭaĵoj, kaj eblas gvati ekzemplerojn de nizaglo, reĝa aglo, kadavrogrifo, migra falko, gufo, monaĥvulturo, iberimperia aglo, nigra cikonio, ktp. La abundo de akvo, plejparte retenita de la baraĵoj de la distrikto, helpis la setliĝon de variaj grupoj de akvobirdoj. Elstaras la artefarita lago de García de Sola. Krome, elstaras abundo de grandaj mamuloj ekspluatitaj por ĉasado aŭ naturobservado, kiel aproj, cervoj, damaoj kaj kapreoloj. Ankaŭ abundas fiŝkaptado pro la artefaritaj lagoj, tre abundaj en la ĉirkaŭaĵoj





.







# Herrera del Duque

Herrera del Duque estas la ĉefurbo de La Siberio. La censita loĝantaro en 2014 estis de 3,706 loĝantoj. Laŭ nombro de loĝantoj estas la plej loĝata de la komarko jam ekde la 16a jarcento, kaj influcentro por la najbaraj municipoj. Ĝi estas sidejo de la jurisdikcia teritorio de Herrera del Duque, kaj laŭ la katolika eklezio unu de la tri subdividaĵoj de la diocezo de Toledo en Ekstremaduro, do ties eklezia teritorio apartenas al neniu el la diocezoj de la regiono.

Situanta en la plej nordokcidenta pinto de la provinco de Badajoz, ĝi distas 200 km de Badajoz, provinca ĉefurbo. Krome ĝi estas je 137 km for de Mérida, regiona ĉefurbo, je 152 km for de Cáceres, provinca ĉefurbo de la alia provinco en la regiono (do pli proksime ol al la propra provinca ĉefurbo), kaj 233 km for de Madrido, nome ŝtata ĉefurbo (do nur iomete pli malproksime ol al la propra provinca ĉefurbo).

Rimarkindas la Preĝejo de Sankta Johano Baptista, franciskana konvento, ermitejo Consolación (konsilo) aŭ la kastelo-fortikaĵo. De la geografia ĉirkaŭaĵo, elstaras la regiona rezervejo Cijara kaj la montaro Golondrinos - Puerto Peña, en kies rokaĵoj nestas kolonioj de ansergrifoj kaj agloj.

En la aktualo Herrera estas dotita per diversaj servoj, danke al kiuj ĝi efektive utilas al la tuta komarko kiel centro de ekonomia, komerca, institucia, kultura kerno. La Kulturpalaco estos la kongresejo de la 75a Hispana Kongreso de Esperanto. En ĝi okazas regule kurso de Esperanto. La lokaj aŭtoritatoj ege apogis ambaŭ agadojn.







# Guadalupe

Guadalupe estas kaj vilaĝo (nomita laŭ samnoma rojo) en la provinco Cáceres kaj tiea monaĥejo. La Reĝa Monaĥejo Sankta Maria de Guadalupe estas grava arkitektura, kultura kaj religia objekto, ege simbola en la regiono Ekstremaduro, kaj de tie tiu simbolo, kun la respektiva virgulino, estis alportita al multaj lokoj de Latinameriko. Ekzemple en Meksikio ege gravas la adorado al Nia Damo de Gvadalupo. En ties interno videblas la gotika, mudeĥara, renesanca, baroka kaj novklasika stiloj, tio estas, ekde la 14a al la 18a jarcentoj. Laŭlonge de la historio la monaĥejo estis ege rilata al la reĝoj, unue de Kastilio, poste de Hispanio, kaj ĉirkaŭ ĝi disvolviĝis multaj historiaj epizodoj, kiaj renkontiĝoj de nobelaro kaj reĝoj, politikaj traktaĵoj, militpreparoj, ekspedicioj, bataloj ktp.

Vizitindas en la konstruaĵaroj de la monaĥejo, diversaj fakaj muzeetoj, klostroj kaj kortoj, la loka preĝejo, la luksega sakristio, la ĉambro de la virgulino kaj apartaj arkitekturaj elementoj. En la diversaj lokoj admirindas nombraj artaĵoj de plej diversaj fakoj. La loko rilatas al momentoj de la vivo de ekzemple Kristoforo Kolumbo, la Katolikaj Gereĝoj, Filipo la 2-a, la diversaj militoj ktp. Per tiu vizito oni lernos multe pri la historio de Hispanio, sed ne nur, ankaŭ temos pri Latinameriko, Portugalio, judoj, enlanda milito ktp.

Kuriozaĵo estas ke tiu elstarega monumento inkrustas en tute montara natura ĉirkaŭaĵo de densa arbaro kaj allogega pejzaĝo, ege kontraste en apenaŭ loĝata teritorio.



# 75a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO. PROGRAMO

**ĴAŬDON, LA 30AN DE JUNIO**

| | AŬDITORIO | ĈAMBRO 1 (UNUA ETAĜO) | ĈAMBRO 2 (DUA ETAĜO) | ĈAMBRO 3 (DUA ETAĜO) | HALO |
|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | |
| 10:00 - 11:00 | | AMo-seminario | | | |
| 11:00 - 12:00 | | | | | |
| 12:00 - 13:00 | | | | | |
| 13:00 - 14:00 | AKCEPTO URBODOMO (ekster sidejo) | | | | |
| 14:00 - 15:30 | | | | | |
| 15:30 - 16:00 | | | | INAŬGURO DE EKSPO-ZICIOJ | AKCEPTO DE KON-GRESANOJ |
| 16:00 - 17:00 | | AMo-seminario | | | |
| 17:00 - 18:00 | | Renkonto de ret-lernantoj kaj unuafojaj kongresanoj | | | |
| 18:00 - 19:00 | Elena kaj Mariam: Lingvoj en Dagestano (Rusio) | | Kurso por progresantoj | | |
| 19:00 - 20:00 | Katerina kaj Elena: La rusa Siberio | | | | |
| 20:00 - 21:00 | | | | | |
| 21:00 - 22:00 | SOLENA INAŬGURO | | | | |
| 22:00 - 23:00 | MUZIKA-LIRIKA VES-PERO Miguel Fernández | | | | |
| 23:00 - 00:00 | KONCERTO DE ASORTI | | | | |

## VENDREDON, LA 1AN DE JULIO

| | AŬDITORIO | ĈAMBRO 1 (UNUA ETAĜO) | ĈAMBRO 2 (DUA ETAĜO) | ĈAMBRO 3 (DUA ETAĜO) | HALO |
|---|---|---|---|---|---|
| 10:00 - 11:00 | Kani: Ekstremaduro, lando de limoj kaj kontaktoj. | AMo-seminario | AMo-seminario | | AKCEPTO DE KON-GRESANOJ |
| 11:00 - 12:00 | HEF:Prezentado de la bita eldono de Donkiĥoto | | | | |
| 12:00 - 13:00 | István Ertl: Traduki, redakti pri E-tekstoj | | Kurso por progresantoj | | |
| 13:00 - 14:00 | Miguel Fernández: Prezentado de novaj libroj | | | | |
| 14:00 - 15:00 | | | | | |
| 15:00 - 16:00 | | | | Ekspozicioj | |
| 16:00 - 17:00 | Mikaelo Bronŝtejn: Akceptu mondo min amike | | | | |
| 17:00 - 18:00 | Duncan Charters: Espe-ranta Literaturo | | Kurso por progresantoj | | |
| 18:00 - 19:00 | Ibera Skolo. Omaĝo al Jorge Camacho | | | Libroservo | |
| 19:00 - 20:00 | Jorge Camacho: Pre-zentado de nova poe-maro. | | Kunveno de HEJS | | |
| 20:00 - 21:00 | | | | | |
| 21:00 - 22:00 | TEATRO. LA KREDITO GEORGO KAJ SAŜA | | | | |
| 22:00 - 23:30 | KONCERTO ĴOMART KAJ NATAŜA | | | | |

**SABATON, LA 2AN DE JULIO**

10:00 Vojaĝo al Guadalupe. Vizito de la Monaĥejo.
14:30 Komuna tagmanĝo.
16:00 Kulturdomo: "Alia Guadalupe" de Kani. KONCERTO KOMUNA.
18:30 Ekiro al la rivero. Tempo por banado. Rigardado de vulturoj...
20:30 Ekiro al Peloche. Vespermanĝo.
22:30 Koncerto de Acetre. Placo de Peloche
00:30 Ekiro al Herrera del Duque.

**DIMANĈON LA 3AN DE JULIO**

| | **AŬDITORIO** | **ĈAMBRO 1 (UNUA ETAĜO)** | **ĈAMBRO 2 (DUA ETAĜO)** | **ĈAMBRO 3 (DUA ETAĜO)** | **HALO** |
|---|---|---|---|---|---|
| 9:30-10:00 | Provo Vivu la teatro! | Ĝ.K. de HEF (unua kunvoko) | | | |
| 10:00 - 11:00 | | Ĝenerala kunveno de HEF | | Libroservo<br>Ekspozicioj | Ŝakludo |
| 11:00 - 12:00 | Mikaelo Bronŝtejn: Romano pri E-movado (1918-1938) | | | | |
| 12:00 - 13:00 | Malferma prezentado de asocioj, kongresoj kaj eventoj | Jorge Camacho: Poezio de Baldur Ragnarsson | Kurso por progresantoj | | |
| 13:00 - 14:00 | Provo Vivu la teatro! | Xavi Alcalde: Esperantistoj dum la Unua Mondmi-lito | Javier Romero: Martinus kaj Zamenhof | | |
| 14:00 - 15:00 | | | | | |
| 15:00 - 16:00 | | | | Libroservo | |
| 16:00 - 17:00 | Félix Jiménez Lobo: Studo en la Universi-tato de Poznan | Annie Grente: Esperanto kaj Tanzanio | Kunveno de SATeH | | |
| 17:00 - 18:00 | Isván Ertl: Migrado en la realo kaj literature | Lucas Barbosa: Tupia, indiĝena lingvo de Brazilo | | | |
| 18:00 - 19:00 | jOmO kaj amikoj | | | | |
| 19:00 - 20:00 | | | | | |
| 20:00 - 20:30 | OFICIALA FERMO DE LA KONGRESO | | | | |
| 20:30 - 22:00 | | | | | |
| 22:00 - 23:30 | VIVU LA TEATRO! | | | | |

**LUNDON, LA 4AN DE JULIO**

10:00 Vojaĝo al Trujillo kaj Cáceres.
11:30 Vizito Trujillo
13:30 Ekiro al Cáceres.
14:30 Tempo por tagmanĝi
16:00 Libera vizito al la antikva urbocentro de Cáceres

---

# Ibera Skolo

## Ekstremaduro

Anzinoj verdas intense
sur grene helverda ruro.
Dum ni vojas okcidenten,
la glacojn de l' aŭtobuso
surpriza pluv' ekatakas
per insidaj akvogutoj.
Anzinara horizonto
ŝirmata de pezaj nuboj.
Super grizaj montoj flugas,
suverene, la vulturoj.

## Extremadura

Encinas de verde intenso
sobre un trigal verde claro.
Insidiosas gotas de agua
de un sorpresivo chubasco
atacan nuestro autocar
cuando hacia poniente vamos.
Horizonte de encinares
bajo un cielo encapotado.
Sobre montes grises vuelan
altos buitres soberanos.

Noto:
anzino: (hispane *encina*, katalune *alzina*, portugale *azinheira*)
ĉiamverda ilekskverko.

El *La silika hakilo*, de Jorge Camacho, Mondial. Novjorko, 2011,134 p., ISBN 9781595692269.

## Mia Siberio

Jen eĥiĝas cervo-muĝar' ĉi-lande
sur montoj plenaj de belec' natura
Di-donaco al land' Ekstremadura
Aerblovo kisanta vin konstante

Trapaŝas ĝiajn valojn mi grandkvante
Kaj ĝiajn montojn tra densejo pura
Vin mi serĉis en nokto plej obskura
kaj vi staris min tamen atendante

Mia svatiĝant-am' al vi ne ĉesos
Vi min akceptis kiel filon foran
Ho pacienca panjo bon-espera

Neniam viajn anojn mi forgesos
Nek ties grandan amon plej elkoran.
Ĉiame mi memoros vin Herrera.

(*En traduko de Miguel Fernández*)

## Mi Siberia

Ecos de venados berreando
en montes preñados de hermosura
Un regalo de Dios a Extremadura
Soplo de aire que te está besando

Recorro sus valles caminando
Y sus montes metido en la espesura
Te he buscado en mi noche más oscura
y al llegar me estabas esperando

Te conocí y te amé cual pretendiente
Me acogiste como a un hijo olvidado
Como una madre paciente que espera

Nunca podré olvidar a tu gente
Que con tanto cariño me han tratado
Siempre te recordaré Herrera.

Valentín Fernández Muñoz

## Omaĝe al Ekstremaduro

Fratoj.
Per Castilblanco-Casas Viejas, fratoj.
Ekstremaduro kaj Andaluzio:
Malsato, ŝvito, servutec', ofendoj...
kronikaj, ignorataj aŭ benataj
de la homoj de Di' kaj de Cezaro.
Kaj justa opa krevo de la galo.
Fratoj kaj "sanktaj senkulpuloj", fratoj
de "belaj milvoj", grandanimaj homoj
kapablaj ĉashundumi devigataj de l' mastro
sen perdi la dignecon.

Fratoj per la prononco, per la suda
nobla kutimo kalki la mizeron.
Per blindigaj rebriloj kaj puregaj lazuroj.
Per hejmveoj en plej lontanaj landoj…
… Kaj ŝia okulparo,
en La Vera,
inter printempa neĝo ĉerizarba
kaj la viviga ruĝo de papriko,
kaj ĉe verda vit-mar': Almendralejo.
Ŝia rigardo,
klara, senmakula,
kroĉita miasonĝen kiel heder' al muro.
Kaj la vibranta "ni" de geamuntoj.

*Miguel Fernández*

## RAFAEL ALBERTI (1902-1999)

## BUBOJ EN EKSTREMADURO

En Ekstremadur' senŝuas
niaj buboj.
Kiu ŝtelis ties ŝuojn?

Ilin frapas varmoj, neĝoj.
Kiu ŝiris ties vestojn?

Pluv' atingas
kaj la litojn kaj la dormojn.
Kiu rabis ties domojn?

Kaj ne scias
ili l' nomon de la steloj.
Kiu fermis la lernejojn?

En Ekstremaduro tristas
niaj buboj.
Kiu ŝtelis ties ludojn?

(El Miguel Fernández, *Poezio: armilo ŝargita per futuro*, pluraj aŭtoroj, SATeH, Madrido, 2013)



# SIBERIA SKOLO

## Miĥail Fernandoviĉ

La mar’

kaj mi.

La lag’

kaj vi.

Ĉu l’maro orakolas?

Ĉu la lag’ karakolas?

Ĉi tie

la lag’

estas mar’.

## Georgo Litaĉov

ĉies vivo, ankaŭ mia, estas

unuvorta palindromo.

tiel umas mi

tial nunas mi

mi volus diri, ke mi nun
enuas.

neŭrastenio



## Liten Dek

Iras

vi

kaj

miras

kun

vi

kiel

ŝip

## Ksavi ErerovIĉ

Enorma kongres'

kaj la cerv'

sur la mont'

Amkri'

Kia dezir'



# Listo de Hispanaj kongresoj

| N-ro | Jaro | Urbo |
|---|---|---|
| 1 | 1920 | Barcelona |
| 2 | 1921 | Zaragoza |
| 3 | 1923 | Valencia |
| 4 | 1924 | Bilbao |
| 5 | 1925 | Córdoba |
| 6 | 1926 | Madrid |
| 7 | 1928 | Sevilla |
| 8 | 1929 | Oviedo |
| 9 | 1932 | Madrid |
| 10 | 1933 | Santander |
| 11 | 1936 | Barcelona |
| 12 | 1951 | Tarrasa |
| 13 | 1952 | Valencia |
| 14 | 1953 | Bilbao |
| 15 | 1954 | Zaragoza |
| 16 | 1955 | Gijón |
| 17 | 1956 | Barcelona |
| 18 | 1957 | Madrid |
| 19 | 1958 | Castellón |
| 20 | 1959 | Málaga |
| 21 | 1960 | Pontevedra |
| 22 | 1961 | Palma de Mallorca |
| 23 | 1962 | Valladolid |
| 24 | 1963 | Barcelona |
| 25 | 1964 | Valencia |
| 26 | 1965 | Palencia |
| 27 | 1966 | Bilbao |
| 28 | 1967 | Zaragoza |
| 29 | 1969 | La Laguna |
| 30 | 1970 | Mieres |
| 31 | 1971 | Alicante |
| 32 | 1972 | Vigo |
| 33 | 1973 | Madrid |
| 34 | 1974 | Valladolid |
| 35 | 1975 | Lleida |
| 36 | 1976 | El Ferrol |

| N-ro | Jaro | Urbo |
|---|---|---|
| 37 | 1977 | Sabadell |
| 38 | 1978 | León |
| 39 | 1979 | Gijón |
| 40 | 1980 | Madrid |
| 41 | 1981 | Murcia |
| 42 | 1982 | Málaga |
| 43 | 1983 | Zaragoza |
| 44 | 1984 | Sevilla |
| 45 | 1985 | Cartagena |
| 46 | 1986 | Vigo |
| 47 | 1987 | Madrid |
| 48 | 1988 | Valencia |
| 49 | 1989 | Bilbao |
| 50 | 1990 | S. Cugat del Vallés |
| 51 | 1991 | La Laguna |
| 52 | 1992 | Mérida |
| 53 | 1994 | Málaga |
| 54 | 1995 | Salou |
| 55 | 1996 | Murcia |
| 56 | 1997 | Valencia |
| 57 | 1998 | Valladolid |
| 58 | 1999 | Castellón |
| 59 | 2000 | S.S. de los Reyes |
| 60 | 2001 | San Javier |
| 61 | 2002 | Alicante |
| 62 | 2003 | Valencia |
| 63 | 2004 | Bilbao |
| 64 | 2005 | Alcalá de Henares |
| 65 | 2006 | El Puig |
| 66 | 2007 | Palos Frontera |
| 67 | 2008 | Cuenca |
| 68 | 2009 | Málaga |
| 69 | 2010 | Stgo. Compostela |
| 70 | 2011 | El Escorial |
| 71 | 2012 | Almagro |
| 72 | 2013 | Zaragoza |
| 73 | 2014 | Ronda |
| 74 | 2015 | Cullera |
| 75 | 2016 | Herrera del Duque |

En la komenco, la nomo de la unuaj estis diversa. Ekzemple, la unua (en 1920) estis nomata UDKEILO: Unua Diskutanta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj. En 1968 okazis la Universala Kongreso en Madrido, kaj en 1993 en Valencio.

# Listo de aliĝintoj

1 -- Javier Romero -- Herrera del Duque (Ekstremaduro)
2 -- José María Salguero -- Don Benito (Ekstremaduro)
3 -- Carmen Cidoncha -- Don Benito (Ekstremaduro)
4 -- Raúl Martínez Anguita -- Ciudad Real (Kastilio - Manĉo)
5 -- José Antonio del Barrio -- Alkorkono (Madrido)
6 -- Miguel Gutiérrez Adúriz -- Santandero (Kantabrio)
7 -- Miguel Fernández -- Madrido
8 -- Jorge Camacho -- Ekstremaduro / Madrido
9 -- Ana Manero García -- Madrido
10 -- Manolo Parra -- Madrido
11 -- Xavi Alcalde -- Barcelono
12 -- Mar Aranda Seguro -- Don Benito (Ekstremaduro)
13 -- Jara Aranda Seguro -- Don Benito (Ekstremaduro)
14 -- Mar Márquez -- Medellín (Ekstremaduro)
15 -- Violeta Carracedo Casado -- Don Benito (Ekstremaduro)
16 -- Francisco Gómez López -- Don Benito (Ekstremaduro)
17 -- Íñigo López Mulet -- Don Benito (Ekstremaduro)
18 -- Jesús Miguel García Iturrioz -- Portugalete, Biskajo
19 -- Guadalupe Casilla Mimbrero -- Galdakao, Biskajo
20 -- Nataŝa Gerlach -- Stokholmo (Svedio)
21 -- Ĵomart Amzeev -- Kazakio / Svedio
22 -- Itziar Artetxe Urrutia -- Bilbao, Biskajo
23 -- Angelita Sanz Mayor -- Madrid
24 -- Francisco Conejero Sánchez -- Castellón
25 -- Inés Comabella Aguiló -- Castellón
26 -- Ángel Arquillos López -- Málaga
27 -- Mariló Torres Mateos -- Málaga
28 -- Angel García Gutierrez -- Santander
29 -- Irina Grigorieva -- Santander
30 -- Gabriel Morales Romero- El Puerto de Santa María-Hispanio
31 -- Irene Fernández-Sanz González -- El Puerto de Santa María
32 -- Jean Marc Leclercq -- Toulouse (Francio)
33 -- Francisco López -- Bilbao
34 -- Edvard Pishchikas -- Visiganas, Litovio
35 -- Elena Pishchikas -- Visiganas, Litovio
36 -- Edgar Pishchikas -- Visiganas, Litovio
37 -- Ana Belén Navarro Gutiérrez -- Herrera del Duque
38 -- Mikaelo Bronshtejn -- San Petersburgo, Rusio
39 -- Samba Faye -- Dakaro, Senegalo
40 -- Saioa Escobar Calzada -- Barcelona
41 -- Águeda Biurrún González -- Madrido

43 -- Juan Trenado Serrano -- Madrido
44 -- Ekaterina Kapitonova -- Madrido
45 -- Suso Moinhos -- Vigo
46 -- István Ertl -- Luksemburgio
47 -- Rafael Moncalián García -- Muriedas (Kantabrio)
48 -- Pedro Ullate López -- Muriedas (Kantabrio)
49 -- Rosa Santiago Mancebo -- Santander
50 -- Alberto Corral Martín -- Santander
51 -- María del Rosario Díaz de la Fuente. --Santander
52 -- Pablo González González -- Santander
53 -- Mari Carme Gosalvez -- Herrera del Duque
54 -- Samuel Salgado Bermejo -- Herrera del Duque
55 -- Jaime Díez -- Herrera del Duque
56 -- María José Monjo -- Herrera del Duque
57 -- Lola Carpio -- Herrera del Duque
58 -- Pavlina Sidlova -- Valdecaballeros
59 -- Jirko Sidlova -- Valdecaballeros
60 -- Halina Radola -- Gostyn (Pollando)
61 -- Rosa López Martín -- Terrasa
62 -- Antoni Comellas García -- Terrasa
63 -- Carlos G. Spinola -- Málaga
64 -- Conchi Fernández -- Málaga
65 -- Irek Bobrzak -- Warszawa (Pollando)
66 -- Georgo Handzlik -- Bielsko-Biala (Pollando)
67 -- Sasa Pilipovic -- Kragujevac (Serbio)
68 -- María del Mar Navarro Gutiérrez -- Málaga
69 -- Borja Agustín Alías Garzón -- Málaga
70 -- Inma Ledesma García -- Herrera del Duque
71 -- Paula Cristina Medve -- Beirão Preto (Brazilo)
72 -- Altantsetseg Myagmar -- Ulaanbaatar (Mongolio)
73 -- Wieslawa Gaszkowiak -- Gostyn (Pollando)
74 -- Ana María Jiménez Navarro -- Málaga
75 -- Hubert De Meyere -- Bouffioulx (Belgio)
76 -- Michèle Villers -- Bouffioulx (Belgio)
77 -- Katerina Arbekova -- Novosibirsko (Rusio)
78 -- Svetlana Meŝĉerjakova -- Krasnojarsko (Rusio)
79 -- Ricardo Biurrún González -- Madrid
80 -- Antonio Valén -- Vigo
81 -- Paulo Branco -- Lisboa (Portugalujo)
82 -- Diemante Aniciene -- Lisboa (Portugalujo)
83 -- Luis Enrique Hernández García -- Valladolid
84 -- Rafaela Ureña Álvarez -- Valladolid
85 -- Chouchouna Nseka Makumba -- Kinshasa (DRKongo)

86 -- Félix Manuel Jiménez Lobo -- Madrido
87 -- Matilde Montero Sánchez -- Madrido
88 -- Luna Nunes -- Vermelha (Portugalio)
89 -- Jorge Sanz Martínez -- Collado Villalba
90 -- Andrea Sanz Martínez -- Collado Villalba
91 -- María Isabel Martínez Moral -- Collado Villalba
92 -- Pedro Sanz Sanz -- Collado Villalba
93 -- Lucas Barbosa -- Joao Pessoa (Brazilo)
94 -- Elena Sepiĥanova -- Maĥaĉkala (Rusio)
95 -- Mariam Sepiĥanova -- Maĥaĉkala (Rusio)
96 -- Juan García del Río -- Malago
97 -- Juan Antonio del Castillo Martínez -- Madrido
98 -- Annie Grente -- Reims (Francio)
99 -- Enrique Navarro Rubio -- Zaragozo
100 -- Luz Vázquez Souto -- Reus
101 -- José María Rodríguez Hernández -- Córdoba
102 -- Alejandro Pareja -- Valdemoro
103 -- Jesús García Cano -- Albacete
104 -- Marlon Garren -- Asheville (Usono)
105 -- Miguel Boieiro -- Alcochete (Portugalio)
106 -- Ma. Manuela Boieiro -- Alcochete (Portugalio)
107 -- Rui Vaz Pinto -- Leça da Palmeira (Portugalio)
108 -- Ma. Alejandrina Timóteo -- Leça da Palmeira. (Portugalio)
109 -- Lupe Sanz Bueno -- Madrido
110 -- Carmen Suárez -- Madrido
111 -- Jorge Pavón Fernández -- El Escorial
112 -- Pedro Garrote Escribano -- Valladolid
113 -- Eduardo Larrouy -- Bilbao
114 -- Luis Eduardo Berdor Remón -- Zaragozo
115 -- Pedro A. Hernández -- Madrido
116 -- Yasna Hernández -- Madrido
117 -- Balogi Moshaokwe -- Madrido / Bocvano
118 -- Gilmar Moshaokwe -- Madrido
119 -- Jesús Ordóñez Puebla -- Madrido
120 -- Jaime Vinielles de Pereda -- Madrido
121 -- Pablo Tomás Conesa García -- Zaragoza
122 -- Enric Baltasar -- Valencio
123 -- Duncan Charters -- Usono
124 -- Agnieszka Mozer -- Varsovio (Pollando)
125 -- Sylwia Citko -- Varsovio (Pollando)
126 -- Elena Sharavina -- Krasnojarsko (Rusio)
127 -- José Rodríguez -- Madrido
128 -- Joan Clos Rigual -- Vilafranca del Penedes

129 -- Cecily Lee -- Elsah (Illinois-Usono)
130 -- Manel-Jaume Sales Carda -- Renau (Tarragona)
131 -- Andrea Ivnik Skalja -- Rijeka (Kroatio)
132 -- Josep María Serrano Subietas -- Tarragona
133 -- Andi Plaza Aguayo -- Badajoz
134 -- Angel Mañero González -- Valencio
135 -- Pablo Busto González -- Sevilo
136 -- Belén Rodríguez Macías -- Sevilo
137 -- Baye Mor Guèye -- Dakar (Senegalo)
138 -- María Lourdes Martínez -- Heidelberg (Germanio)
139 -- Emilio Sanz Mata -- Castelldefels
140 -- Francesc Inglada -- Tarragona
141 -- Sol Roca -- Tarragona.
142 -- Mirjam Walter -- Timisoara (Rumanio)
143 -- Flora Devi Hernández Walter -- Timisoara (Rumanio)
144 -- Francisco Javier Moleón -- Bruselo (Belgio)
145 -- Lija Mazij -- Alikanto
146 -- Jordi Perera Faura -- Castellterçol (Katalunio)
147 -- Maria Roser Bach Serra. Castellterçol (Katalunio)
148 -- Hans Adriaanse -- Nederlando
149 -- Juan Antonio Torres -- Sevilo
150 -- Pedro Mansilla -- Madrido

Salutvortoj de la presidanto de UEA

al la 75a Hispana Kongreso de Esperanto

Karaj kongresanoj,



Kongresoj estas konstantaĵo en la vivo de Esperantujo. El ili ni ĉerpas ne nur inspiron kaj energion por niaj ĉiutagaj vivoj, sed ankaŭ persiston kaj paciencon por la longa daŭro. Kaj kongresoj kun jublieaj numeroj, kiel la pasintjara 100a UK en Lillo, aŭ via nuna 75a Hispana Kongreso, krome donas okazon fari bilancon kaj strategion, rigardi maltantaŭen kaj antaŭen.

Pri la specifa historio de via landa movado mi ne estas kompetenta, nek mi povas konsili al vi, kiel plej bone plukonstrui sur tiu bazo. Sed mi ŝatus dividi kun vi kelkajn demandojn, kiuj nun okupas la tagordon de la Estraro kaj Komitato de UEA.

Kiam mi fariĝis esperantisto, antaŭ kvardeko da jaroj, informado ankoraŭ okazis ĉefe per presaĵoj, kaj instruado okazis plejparte en lokaj kursoj, aŭ per libroj por memlernado. Interreto ŝanĝis ĉion ĉi. En la lasta jaro, pli ol 400.000 homoj eklernis Esperanton per la reta kurso ĉe Duolingo. Verŝajne pluraj milionoj iam trafis retan mencion pri Esperanto. La kunplektado de la mondo kreis kondiĉojn, en kiuj nia lingvo povas disvastiĝi kaj disflori kiel neniam antaŭe.

Tamen niaj organizaj strukturoj kaj ofte niaj pens- kaj ag-manieroj ĝenerale ne multe evoluis de la antaŭreta epoko. Tio estas natura, kaj kutime necesas almenaŭ unu generacio, antaŭ ol nova teknologio komencas funde modifi la premisojn de la socio. Sed tia momento nun venis. Ni devas trovi manierojn malfermi nian movadon al la centmiloj da novaj lernantoj, kaj al la milionoj da simpatiantoj, kiuj nun aperas tra la mondo. Ni devas fakte kuraĝi ekzameni niajn tradiciojn kaj ŝanĝi tiujn, kiuj ne plu kongruas kun niaj bezonoj.

Tiel, ekzemple, en la venonta Universala Kongreso en Nitro, la Komitato de UEA debatos pri radikalaj ŝanĝoj al nia membrostrukturo, malfermante ĝin al “Amikoj de Esperanto” (kiuj aliĝas senpage) kaj al homoj, kiuj ricevas servojn nur rete. Samkunvene ni traktos plurajn proponatajn ŝanĝojn en la Statuto, interalie por faciligi la perretan kandidatiĝon kaj voĉdonadon de la individuaj membroj en la gvidado de la Asocio. Buĝetpropono por la venonta jaro inkluzivos signifajn sumojn por “movada evoluigo,” cele al la stimulado de lokaj iniciatoj sur niaj ĉefaj agadkampoj -- Konsciigo, Kapabligo kaj Komunumo. Plivastigo de la Volontula Servo kaj de niaj AMO-seminiarioj helpos krei pli da trejnitaj laborfortoj por plenumi tiujn agadojn.

Mi ĝojas, ke via landa asocio jam kontribuas al ĉi tiuj pozitivaj evoluoj, gastigante la 26an AMO-seminarion en ligo kun la 75a kongreso. Sed ni rigardu tion nur kiel komencan paŝon. Nia movado eniras epokon de renovigo, reorientiĝo, reaktualiĝo. Mi esperas, ke en viaj kongresaj diskutoj, same kiel en viaj amikaj kontaktoj kaj konversacioj tra tiuj tagoj, vi kuraĝos levi fundajn demandojn pri niaj agadoj kaj strukturoj. Tri kvaronoj de jarcento estas ja granda kaj prifestinda atingo. Sed kio pri la venontaj 25 jaroj? Kaj la venontaj kvin? La vojo al la 100a Kongreso ja komenciĝas nun. Mi deziras al vi ne nur ĝojpenan feston, sed ankaŭ energian planadon de esperplena estonteco.

D-ro Mark Fettes
Prezidanto de UEA




# Beletra Almanako

ISSN: 1937-3325

**Inter 136 kaj 176 paĝoj**, grando pr. 21 x 13,5 cm

**Prezo**
(inkl. sendokostojn):

unuopa kajero
(al Hispanio): € 15,95

jarabono (3 numeroj)
ekde 2016 (al Hispanio):
€ 42,00

**Por pliaj informoj:**
librejo.com
beletraalmanako.com

**Beletra Almanako (BA)** estas literatura periodaĵo kun inter 136 kaj 176 paĝoj. Jam aperis BA1 (septembro 2007) ĝis BA25 (februaro 2016).

BA estas redaktata de **teamo** konsistanta el **Probal Daŝgupto, István Ertl, Suso Moinhos, Jesper Jacobson** kaj **Tim Westover**. Eldonas ĝin **Ulrich Becker** (Mondial, Novjorko). Jorge Camacho estis ĉefredaktoro ĝis 2015.

BA enhavas diversajn rubrikojn, nome pri poezio, prozo fikcia aŭ nefikcia, eseoj, recenzoj, intervjuoj, leteroj, debato ktp, originale kaj traduke. Aperas en BA materialo speciale verkita por ĝi, sed ankaŭ altkvalitaj tekstoj jam pli frue aperintaj en la reto sed ne surpapere. Ni invitas vin proponi aŭ anonci materialon, propran aŭ aliulan. Ankaŭ ilustristoj (desegnistoj, fotistoj) bonvenas.

**Al la ĝisnunaj BA-aŭtoroj apartenas i.a.:** Mauro Nervi, Baldur Ragnarsson, Jorge Camacho, Alejandro Cossavella, Reinaldo Marcelo Ferreira, Gonçalo Neves, Benoît Philippe, Humphrey Tonkin, Rejna de Jong, Claude Piron, Trevor Steele, Paul Gubbins, Luiza Carol, István Ertl, Carlo Minnaja, Dimitrije Janičić, Edwin de Kock, Mao Zifu, Christian Declerck, Valentin Melnikov, Suso Moinhos, Jesper Jacobson, Carlo Minnaja KAJ MULTAJ ALIAJ ...


# Internaciaj kunlaborantoj en la Hispana Kongreso



JoMo



Ĵomart kaj Nataŝa



Georgo kaj Sasa





Istvan Ertl



Sara Spanó



Duncan Charters



Mikaelo Bronŝtejn



Irek Bobrzak



Sepa kaj Asorti







Carrefour
express

SPAR

